skriblaboroj, precipe por la korespondado. Kaj simile kiel en la lingva sfero jam ekzistas la bezonata lingvo — *esperanto* — tiel ankaŭ nun ekzistas skribo, kiu posedas la ĵus diritajn k postulendajn ecojn, nome *Intersteno.*

Restas montri ankoraŭ kelkajn aliajn preferojn de ĉi tiu skribo, de kiuj dependas ĝiaj nesupereblaj ecoj. La ĝisnunaj steno-sistemoj devenas de la antikvaj longskriboj; multaj steno-sistemoj eĉ transprenis ortografiajn sensencaĵojn k krome kreis novajn. Intersteno estas en ĉi tiu rilato tute alia, vere revolucia: ĝi tute rompis k forĵetis la katenojn de la kutimo, kiu kun sia plej intima parenco, la inerto de la homoj, estas la plej grava malamiko por ĉiu progreso. Intersteno devenas kvazaŭ senpere de la viva parolata lingvo mem; ĝi estas la sola skribo, kies elementoj estas formitaj k ordigitaj tute laŭ la naturo de la elementoj de la lingvoj: la sonoj. Pro tio ĝi estas facile uzebla por ĉiuj lingvoj. Fine ĝi estas en plej mirinda maniero plimallongigebla k tiel ankaŭ taŭgas por la plej alta rapidskribista praktiko. Intersteno do estas vere universala skribo.

Eble oni demandas, kial tia skribo ne jam estas pli bone konata k disvastigata? Nu, unue oni devas atenti, ke ĝi estas publikigita kiel internacia stenoskribo nur antaŭ kelkaj jaroj. La ceteraj kaŭzoj estas la samaj, kiujn oni devas citi klarigante, kial esperanto ne jam estas la dua lingvo de ĉiu kulturcela laboristo, ankaŭ ne en U.S.S.R.! Sed same kiel esperanto estas necesa por la progresigo de nova kulturo, tiel ankaŭ nova universala skribo, nome Intersteno, estas minimume samgrade necesa, ĉar ĝi helpas al pli vigla interŝanĝo de ideoj, al pli vigla mensa aktiveco por rompi la katenojn de letargia k inerta kutimiĝo, kiu estas la plej granda malamiko de la laboristaro.

*F. G.*

## EL MIA VIVO

Mi estas 28-jara fraŭlo-laboristo. Mi naskiĝis k loĝis ĝis la jaro 1921 en la urbo Novorosijsk en Sovetio. Miaj gepatroj estis malriĉaj homoj. La patro mortis, k mi restis sep jarojn en tre mizera stato kun panjo k junaj fratoj. Depost mia 10-a jaro mi jam laboris en diversaj laborejoj, en tre malbonaj kondiĉoj. Post la revolucio mi aliĝis al la lab.profesia sindikato k diversaj organizoj. En tiu ĉi medio mi ekkomprenis mian malbonan sorton k eksciis pri la batalo de l'laboristaro k la maniero kiel batali por plibonigi nian sorton. Sed en 1921 panjo forveturis kun mi k miaj fratoj al Litovio — kapitalista lando.

Alveninte tien mi tuj aliĝis al mia profesia sindikato k „Socialista Junulara Asocio" en la urbo Radviliŝkis. Tie mi multe laboris por la laborista movado, tiel ke oni min baldaŭ elektis kiel estron de kelkaj asocioj. En 1926 mi estis elektita de laboristaj organizoj por veturi en Sovetion kun la celo post reveno komuniki al la litovia laboristaro pri la laborista vivo en Sovetio, ktp. Sed veturi mi ne povis, ĉar en nia lando tiam okazis dekstrula revolucio. Oni min k kelkajn amikojn tuj arestis. Kaj oni veturigis min al la urbo Ŝiaŭli k lokis en la malliberejon por pezaj laboroj.

En la malliberejo mi eksciis pri esperanto k tuj komencis lerni nian karan lingvon. Post forpaso de kelkaj monatoj oni liberigis min (en printempo 1927) k mi komencis denove labori en libero. Mi aliĝis esperantan societon, ĉar laboristaj asocioj estis malpermesitaj; post kelkaj monatoj mi jam estis elektita kiel estro en tiu societo, sed ne por longe.

En septembro 1927 okazis en Taŭrogen maldekstrula ribelo; tiuokaze mi ree estis arestata k veturigata al Ŝiaŭli, sed post esplortraserĉo oni min liberigis. Ĝuinte iom da tempo en libero, mi estis denove arestata en 1928 pro la akuzo de malbona homo el nia esp. societo, kiu denuncis min ĉe la politika (sekreta) polico, ke mi estas ano de l'litova kompartio, havas tiurilatajn gazetojn, ke mi salutis je la nomo de nia societo sovetiajn Gek-dojn okaze de la 11-a datreveno de l'Oktobra revolucio ktp. Tuj okazis rearesto. Ĉe traserĉo la policistoj min forte batis k ŝiris la harojn, tiel ke mi dum kelkaj tagoj ne povis moviĝi k la tuta korpo doloris. Oni min veturigis al la Ŝiaŭli-a malliberejo, kie mi pasigis kelkajn tagojn; poste mi estis forsendata al dua malliberejo en alia urbo — Kaŭnas.

Tie mi renkontis miajn amikojn k trovis multajn K-dojn. En la ĉambro, kie mi sidis, estis el la kulpigitoj 8 komunistoj, 11 socialdemokratoj, 2 social-revoluciuloj k 3 popol-naciistoj. En la tuta malliberejo tiutempe estis 270 politikaj arestitoj. 197 el la kulpigitoj estis komunistoj, inter ili 37 virinoj, 65 socialdemokratoj, la ceteraj estis social-revoluciuloj k popol-naciistoj. Post forpaso de tri monatoj la juĝesploristo liberigis min ĝis la juĝa tago, kontraŭ kaŭcio. Kaj tiam fine mi estis absolvita. Ankoraŭ kelkajn fojojn oni kaptis min k mi sidis en la arestejo, sed pri tio mi ne deziras skribi.

*Stazis Riĉkus (12868).*


## LIBRO-MONATO DE SAT!

**Gek-doj! Por havigi al ni kiel eble plej rapide sufiĉe grandan sumon da kontanta mono k tiel supervenki la momentan financan krizon en nia organizo, ni decidis,**

**dum la tuta monato novembro vendi niajn SAT-librojn kun granda rabato de 33 procento**

**je la ĝisnuna kataloga prezo. Tiu favorprezo je ĉiuj SAT-eldonaĵoj validas nur unu monaton, nome por la mendoj farataj en novembro! La K-doj profitu tiu bonan okazon k superŝutu en novembro nian Administracion per libromendoj!**

**DIREKCIO DE SAT.**


# KONTRAŬ LA DOGMOJN.

## Katolikaj intrigoj en Hispanio.

En la esperantista dusemajna gazeto „Katolika Vivo" oni povis legi finaŭguste artikolon el Hispanio sub la titolo: „Kio okazas en Sankta-Lucia de Ezquioga?" Eĉ ilustro ornamis tiun artikolon, montranta tiun „sanktan lokon", kie du geknaboj (12- k 7-jara) laŭ la priskribo ekvidis aperaĵon de la „Sankta Virgulino" k konversaciis kun ĝi. Poste vidis ĝin ankaŭ kelkaj aliaj personoj (kies biografieton k foton reproduktas „Katolika Vivo"). Laŭŝajne ĉiuj tiuj personoj estas simplaj proletoj aŭ proletidoj. Unu kazo precipe altiris mian atenton, ĉar temas pri plenaĝa laboristo: 28-jara aŭtokondukisto (en la servo de privatulo), kiu laŭdire „svenfalis, ĉar li vidis la aperon de la Sankta Virgulino. Tiel fortan sensacion li sentis, ke li ne povis konduki la aŭtomobilon al Legorreta." Ĉu estas simple koruptita tiu plenaĝa persono k sekve ŝajnigis sian „svenfalon" ktp., aŭ ĉu li agis sub influo de malsana spiritostato, kaŭzita de katolika eduksistemo? Ĉi lastan ni povas senrezerve supozi por la diversaj infanoj cititaj, kiuj kredeble rekte estas sugestitaj de siaj pastraj edukantoj k agis sub hipnotado. Ni ne povas respondi ĉi tie, kiu el tiuj hipotezoj estas la ĝusta, k tio cetere ne gravas. Kio pli gravas, tio estas la sekvo de tiu okazaĵo, pri kiu ni legas i.a.: „La trian tagon (post tiu apero), ĵaŭdon ... el ĉiuj domaroj k vilaĝoj alvenis centoj da personoj, ĉar jam disfamiĝis la novaĵo, k same okazis la vendredon. Kvinan tagon ... iom pli 1500 personoj atendis la infaninon ..., portanta flaman kandelon en unu mano k bukedon en la alia, akompanita de kelkaj pastroj, kiuj, suprenirante la deklivon de la kampo, demandis: — Ĉu vi vidas ion? — Kaj la infanino respondis jese. . ."

„Dimanĉon, 5. julio, ĉeestis proksimume tri mil personoj, la civilgardistoj ... ordigas la transiĝon en la monteto k valo... Mardon, 7. julio, la ĉeestantaro estis pli ol ses mil personoj, multegaj aŭtomobiloj, aŭtoĉaroj, bicikl-